



N-ro 42



1978/3 Septembro

9-a jaro

## Kluba informilo de ELF-AREK

ELF: Esperanto Ligo Filatelista

AREK: Amika Rondo de Esperantaj – Kolektantoj



## La redaktoro kore dankas al

Kurt Lindström,  
Amouroux,  
Menges,  
Tremou,   
Heimlich,  
Wluka,  
Biesiada,  
Dr. Bormann,

Radnai,  
Vana,  
Gimelli,  
Pallares-Gil,  
Simon,  
Baniulaitis,  
Kosieniak

pro senditaj kontribuajoj por povi aranĝi la enhavon de nia informilo.

## Nova membro!

S-ro Mefisto Diablo, Purgatorio. presejo

Intereso: Erarigi ELF-AREK-membraron pere de preseraroj.

Ekzemple sur paĝo 7 en 2/78 li kontribuis al Sovetunio 22 stampojn anstataŭ al Svedio, kiu havas tiujn, dum Sovetunio havas nur unusolan stampon! Ankau en la kreado de neologismoj s-ro Mefisto tre aktivas. tiel ni ekz. trovis en 2/78: volora, bonvulo kaj el nia membro s-ro Hasala li faris tutsimple Hasa.

Al nia novmembro Mefisto ni deziras pluajn sukcesojn!

## La aŭfrankstampo de UEA

Sinjoro doktoro Werner Bormann skribis al la redaktoro:

"En Nw. Binnenweg situas nur la C.O. de UEA, ĝi posedas la domon. Do tiu ĉi stampo estas unusenca: por la scianto ĝi indikas Esperanton, eĉ ĝian centron. Mi certas, ke ĝi estas/fariĝos esperantista kolektaĵo (Esperantaĵo).

La direktoro de C.O. Dro Sadler diris al mi, ke la nuntempa uzo estas provtempa. Se la C.O. de UEA trovos la aplikon de aŭfrankstampilo utila, ĝi por daŭro transprenos ĝin. Tiam la vorto ESPERANTO estos aldonita. Se estos tiel, la 'antauekzempleroj' (la nunaj stampoj) fariĝos eĉ pli valoraj.

Sincere via Bormann"

ROTTERDAM



Nwe Binnenweg 176  
3015 BJ



FR 20678

## ELF-AREK-laborkunsido en Plzen

26–28.5.1978 kunvenis en Plzen 3 de niaj klubaj amikoj: Vilmos Radnai el Hungario, Vladimir Vana el CSSR kaj Rudolf Burmeister el GDR. Ni parolis pri eblecoj de ELF-AREK-kunveno en la kadro de PRAGA 78, pri kompilado de esperantofilatelaj katalogoj, pri ELF-AREK-laborado kaj nelaste ankaŭ havis "komunan vesperon". Nia hungara amiko Vilmos Radnai promesis daurigi la fotolaborojn, kiuj ebligas al ni, prezenti en nia informilo multajn bildojn. Kore ni dankas al la samideanoj Vana kaj "mevo", kiuj gastigis la entute kvar eksterlandajn gastojn.

## "Fina punkto" post Krakow 1912 (!?)

Nia amiko Amouroux sendis fotokopion el kongresa libro, kaj sur paĝo 4a ni povas legi:

"Poŝtoficejo

La kongresa poŝtoficejo troviĝas en la tria domo apud la Akceptejo. La kongresanoj povas tie ne nur ricevadi siajn leterojn, pakajojn, k.s., sed ankaŭ forsendi telegramojn, monon, pakajojn k.t.p. La poŝtoficejo estas do tute kompleta. La oficistoj parolas Esperante.

La korespondataĵoj forsendataj de la kongresanoj estos stampitaj per *speciala kongresa poŝta stampilo*."

Sur la paĝo 50 ni trovas:

"En la vestiblo de la Akceptejo estas lokita leterkesto, destinita por kongresaj poŝtaĵoj. Nur tiuj leteroj, kartoj, presaĵoj k.t.p. estos stampitaj per kongresa stampilo, kiujn la kongresanoj enmetos en la aluditan keston. Poŝtaĵoj ekspeditaj aliloke, ne povos esti provizitaj per kongresa stampo. La kongresanoj uzu nur la leterkeston en la Akceptejo . . . La poŝtoficejo estas ĉiutage malfermita . . ."



Nova E-pm el Bulgario



## Simon poluris la brazilajn!

"Antaŭ jaroj mi studis la brazilajn stampojn kaj la afero estas jena:

Laŭ la regularo de la brazila poŝto ekzistas du diversaj specoj de memorigaj stampiloj. La unua, kiu nuligas poŝtmarkojn, estas permesata nur en esceptaj okazoj kiel nacia kongreso, foiroj, ekspozicioj ktp kaj la inko nepre devas esti nigra. La dua estas ankau oficiala sed ne nuligu la poŝtmarkon. Ankaŭ ĝi dependas de la antaŭa permeso de la poŝto sed ilia uzado estas pli ofta okaze de regionaj kunvenoj, ekspozicioj ktp.

Mi proponas, diferencigi en la katalogo inter nuligaj kaj ornamaj stampoj.

Kompreneble la regulo pri ornamaj stampoj ne tute funkcias bone, ĉar pro filatelaj praktikadoj oni ofte nuligis markon, kiu ne estu per ĝi stampita. Eble la nigra koloro povas esti indikilo, sed tamen estas malfacile, esti certa. Sendube la stampoj 1, 12, 14, 21 kaj 27 estas nuligaj, eble ankaŭ 19. Mi klopodas esplori tion plue.

Alia indiko pri oficialeco estas la vortoj Correio kaj literoj DCT au ECT en la stampoj.

Mi ankau havis okazon, trarigardi malnovan brazilan katalogon de okazaj stampoj, en kiu ĉiuj stampoj, kiujn ni konas, estas listigitaj. Enestas kelkaj detaloj, kiuj estas interesaj por specialistoj:

BRA 2: Poŝtagentejo estis instalita dum la 7a foiro 1934 kaj dum la 8a foiro en 1935

BRA 4: Poŝtagentejo en palaco Itamaraty

BRA 5: Poŝtagentejo en palaco Itamaraty

BRA 6: Poŝtagentejo en Palaco de Belaj Artoj

BRA 7: Poŝtagentejo ĉe la ekspozicio, kiu estis parto de la specimena foiro

BRA 3, 8, 9 kaj 10: Precizaj datoj (Notitaj en la nova stampokatalogo)

Tio estas ĉio en la katalogo, kiu aperis en la 40aj jaroj".

*Werner Simon*

## Kaj li daŭrigas:

Mi ne kredas, ke en la kazo de datstampoj, kiuj akompanas stampojn kiel ekz. NE 14, estas necese havi specialajn numerojn ĉar nur la E-stampo vere gravas. Eble oni povus mencii la uzitajn datstampojn por kompletigi la informon, sed separata numero certe ne estas necesa.

La Retimno-stampo estis konata al la greka katalogisto de specialaj stampoj.

*W.S.*

## Stampo CENTENARIO ESPERANTO

La unua poŝta stampo pri la Centjaro de Esperanto aperis en la itala urbo Montagnana. Nia aktive kunlaboranta Germano Gimelli skribis:

"La 13an kaj 14an de majo 1978 okazis en Montagnana la 9a ekspozicio filatela-numismatika por memorigi la centjaran datrevenon de Esperanto.

La ekspozicia broŝuro enhavis artikolojn pri la historio de la klubo kaj pri Esperanto el la plumo de Vittorio Dall'Acqua kaj foton de Zamenhof.

La lokal filatela-numismatika klubo plie aperigis specialan poŝtkarton (130 Lire), specialan konverton (120 Lire) kun memorigaj privataj alpresoj.

Por mia tie montrita E-kolekto mi ricevis belan medalon.

Speciala poŝta stampo, uzita nur la 13an de majo havas la enskribon CENTENARIO ESPERANTO

Bedaurinde mi ne havas duoblaĵojn de la tutajoj kaj stampoj."

### Stampo de 30a IFEF-Kongreso

Niaj amikoj Wluka kaj Heimlich informis, ke la 30an IFEF-kongreson memorigas speciala poŝta stampo:  
Roma Aurelio, 1978, 15.5  
30 CONGR. INT. FERROVIERI ESPERANTISTI  
ronda kun diametro de 35 mm

### Afrankstampo n-ro 8 variigis

Stanislao Biesiada el Pollando trovis, ke la adreso en la afrankstampo n-ro 8 ŝanĝis. Anstataŭ "Löhne" nun aperas "Paderborn" en la stampo.  
Notu en vian katalogon:  
8-1 Löhne 1 1971  
8-2 Paderborn 1 1978

### Novaj stampoj en Hungario

Nia kluba amiko Kosieniak informis kaj sendis:

- HU 63 Budapeŝto 14-16.7.78  
27a HUNGARLANDA ESPERANTO KONGRESO  
33x33 (fotokopion sendis Radnai)  
HU 64 Abaliget 17.7.78 (nur en tiu tago!)  
IREN 11a (en nova vesto)  
heksagona 50x32

La katalog-numeroj estas provizoraj. Por aliaj urboj anoncigitaj stampoj (i.a. Gyula) verŝajne ne estis uzataj.

HU 63 akompanas bela ore kaj verde surprisita glumarko kun sama bildo kiel poŝta stampo.



## Novaj stampoj en Belgio

Nia kluba amiko Biesiada informis:

BE 15-1 Liege 1.12.76–15.1.77

BE 15-2 Verviers 15.12.76–1.7.77 kaj 15.12.77–15.1.78

ESPERANTO LANGUA INTERNATIONALE

35x23 – maŝinstampo

BE 16 Borgerhout 7.4.78

JUBELTENTONSTELLING pro thema de tassis Esperanto

Mezuro ne konata

Kiu sendas al la redaktoro tiujn stampojn por ke ili povu aperi en nia informila bildparto?

## Esperantajoj de la 30a IFEF-kongreso

"Kongresa Libro" kontraŭ poŝtaj elspezoj

Bildkartoj po liroj 150.–

Glumarkoj po liroj 50.–

Stampoj po liroj 500.– plus sendokostoj

Sendas: P.i. Germano Gimelli, Via Donato Creti 61, I-40 128 Bologna

## Nova franca PP-stampo

Gaston Tremon, nia fakulo pri glumarkoj, sciigis, ke la nova franca stampo ankaŭ aperas kun t.n. "P.P.-datstampo".

Notu en vian katalogon:

44-1 Clermont-Ferrand . . . . .

44-2 Clermont-Ferrand . . . . . (kun P.P.-ds)

Bonvolu konsulti ankaŭ 2/78 informilon.

## Poŝta reko-glumarko "ul. Zamenhofa"

Kaj tamen ĝi ekzistas nur en unu mezuro. Amiko Biesiada sukcesis klarigi la situacion. Apud la normala, jam katalogita reko-glm la poŝtejo en Gdynia 21 uzas por registro de ekspeditaj paketoj t.n. numerigitajn "paket-markojn". En originala kaj neuzita stato tiuj konsistas el kunpresaĵo de du samnumeraj markoj. Dum la ekspeda ceremonio la poŝtisto distranĉas tiun markon, fiksas la maldekstran parton sur poŝtan akompanan konfirmilon kaj la dekstran sur la paketon.

La poŝta konfirmilo post enmanigo de la paketo al la adresato eniras poŝtan arkivon.

Jen la priskribo de la paketmarko:

Numero  
81-240 Gdynia 21  
Zamenhofa  
Waga . . . Kg . . . g

Mezuro: 40x40 mm, blanka papero, nigra surpraso

Arkiva paketmarko: 40x20 mm, sama teksto.

P.S.: La paketmarko ŝajne ekzistas en multaj variaĵoj. De s-ro Czesnonwicz el Gdynia ni ricevis paketmarkon en iom alia mezuro.



## Werner Simon skribas:

### Pri stampo Nürnberg

Mi tre dubas, ke la Nürnberga maŝinstampo ekzistis kun 2 variaĵoj de la steloj. Ŝajnas al mi, ke la steloj iom post iom estis foruzitaj kaj tiel la kadro kunfluis kun la interna stelo. Komparu la datojn! La steloj sen kadro ĉiam estas pli malfruaj ol la originalaj steloj kun kadro.

### Nigra E-pm de Aŭstrio

La nigra aŭstra E-pm ne estas io nova. Dum jaroj la aŭstra poŝta administracio forsendis nigrajn specimenojn de novaj eldonoj kune kun klariga folio, precipe al filatelaj gazetoj ktp. Ili estas la tiel nomataj "nigrapresaĵoj", kiujn eĉ la federala germana poŝto eldonis dum lastaj jaroj. Estas interese, ke ili ekzistas nur, se la marko estas presita per "Stichtiefdruck", kaj tial neniu nigra marko ekzistas por la verda pm de 1949, kiu estis presita per "Rakeltiefdruck". Mi ankaŭ menci, ke mi posedas klarigan folion por la 1949 poŝtmarko, kompreneble sen specimena marko.

### Svedaj datoj

Mi ricevis fotokopion de sveda katalogo de specialaj stampoj. Nia SVE 1 estas listigita kun datoj de 15–22.8 (kostas 300 kronoj!), SVE 2 de 4–11.8 (50 kronoj) kaj SVE 3 kiel en nia katalogo (50 kronoj). Nia SVE 1 do estas unu el la plej multekostaj svedaj poŝtstampoj.!

★ ★

### E-poŝta karto de Aŭstrio kaj Popov-pm

"Mi havas poŝtan karton kun enpresita E-pm (20 g) de Aŭstrio. Estus interese, scii pli pri ĝi, antaŭ ĉio, ĉu vere ĝi estas oficiala. Ankaŭ antaŭ jaroj mi akiris brunan presprovaĵon de la rusa Popov-pm. Vidu la fotokopion. Temas pri iuspeca maldika kartono, dorsflanke kun presitaj cirilaj vortoj ĉu indas, meti ĝin en albumon, aŭ ĉu mi ĝin flankenmetu! Kiu povas diri, ĉu oni rajtas eksponi tiujn du filatelaĵojn?"

A-G Strönne

**Redaktora noto:** La poŝtkarto estas certe poŝta raraĵo, tre malofte trovება! Pri la Popov-a provpresaĵo (20 k) mi ne estas kompetenta respondi. Kiu el nia membraro povas doni ekzaktajn kaj pli detalajn klarigojn. Ni volonte skribus pri tio en nia informilo.



## Nova eksterkategoria poŝta stampo

La poŝtejo Gdynia 21 (en Pollando) uzadas por korespondado adres-stampilon kun la teksto: URZAD Pocztwo-Telkom . . . , ul. Zamenhofska 15 . . . Mi pensas, ke tiu stampo estas por ni interesa el filatela vidpunkto, kaj, ke eble ni ĝin notu sub la rubriko "Aliaj poŝtaj stampoj", ĉar temas ja sendube pri vera "poŝtkontora stampo".

(URZAD signifas "oficejo" – Biesiada.)

Kian opinion havas niaj filatelistoj pri tio?



## Cent jaroj de Esperanto

Bonegaj ideoj obsedis nian redaktoron Burmeister pri tio, kiel celebri centjaron de nia lingvo! Mi plene aprobas la ideon eldoni luksan katalogon pri ĉiuj E – filatelaĵoj. Koncerne poŝtmarkojn, stampojn, tutajojn, ni ne trovos grandajn problemojn: sed necesus certe mencii almenaŭ la plej gravajn pionirojn (oni povas trovi koverton kun adreso kaj eĉ ne scias pri ĝia historia kaj dokumenta valoro por la kolekto), plie montri ankaŭ poŝtmarkojn kaj stampojn, kiuj je unua vido havas kun Esperanto nenion komunan, sed kiuj tamen apartenas al bona kolekto – ekzemple esperantistoj, protektantoj de kongresoj, organizaĵoj kiuj uzadis aŭ subtenis Esperanton ktp ktp. Siatempe mi revis pri tio, ke mi povus ion similan fari – sed tiu laboro estas super fortoj de unu homo. *Mi proponas, ke ni komencu tuj!*

Sin anoncu tiuj niaj geamikoj kiuj volas kunlabori kaj fari ian "redaktan komitaton" por tiu ĉi eldono: ja ĉiuj povas helpi, ĉu per historiaj informoj, ĉu per elserĉado de poŝtmarkoj en katalogoj, per trarigardo kaj prizorgo de katalogoj pri porokazaj stampoj de diversaj landoj / mi estas certa, ke pere de porokazaj stampoj ni povus dokumenti tiujn flankojn de la historio, pri kiuj ni ne povas nun eĉ revii. Preparti tian verkon estos vere herostrata laboro, kaj la tempo ne atendas! Mi anoncas min kaj helpos laŭ miaj fortoj.

Male, ekspozi niaj kolektojn aŭ ian komunan ekspozaĵon dum la jubilea E-kongreso mi ne rekomendas pro la simpla fakto, ke tie ne estas garantiita sekureco kaj nedifektebleco de niaj materialoj, inter kiuj troviĝas jam veraj juveloj kaj unikajoj. Oni eble povus pripensi la aferon, se la LKK garantius aranĝon de ekspozaĵoj kaj ilian sekurecon same kiel ĉe filatelaj ekspoziĉioj.

Jubilea E-filatela ekspoziĉio: same bonega ideo! Sed – ĉu ni havus sufiĉe da ekspozaĵoj? Tamen, multaj el ni havas sufiĉe da interesa materialo kaj eble povus sian ekspozaĵon prepari, restas ja ankoraŭ 9 jarojn da tempo . . . Sed ĉar



laŭ miaj spertoj oni ofte ne scias, kiamaniere la ekspozitaĵoj prepari por ke ĝi vere inde reprezentu sian posedanton kaj estu ankaŭ bone pritaksita, necesus, al niaj membroj helpi. Mi preparis verketon "*Kiel prepari ekspozitaĵojn je la temo Esperanto*", kiu aperis ĉefe kaj plaĉis tiom, ke oni min admonis ekspoziti ĝin en PRAGA 1978. Mi pretus, se estus intereso kaj eldonebleco, tralabori ĝin multe pli profunde el la vidpunktoj de moderna filatelio, por ke niaj klubaj geamikoj havu praktikan helpilon. Krom tio certe *necesus fondi anguleton* pri prilaboro de niaj kolektoj en nia revuo kaj tie respondi ĉiujn demandojn. Skribu do al la redaktoro:

a) ĉu vi havus intereson pri simila verketo (aŭ verko)

b) ĉu vi samtempe promesas (nedevige nun) provi fari ekspozitaĵojn por nia komuna ekspozicio pri Esperanto.

Vladimir Vana, Plzen

### **Redaktoro opinio:**

Mi rekomendas al nia Vana, tuj komenci prilaboron de tiu helpilo por niaj membroj. Nia klubo disponas pri eldonebleco. Tia helpilo eĉ estas nepre necesa kaj grave kontribuus al la plialtiĝo de la reputacio de nia Esperanto-Filatelo, kaj: ĝi estus baza ŝtono por nia Jubilea E-filatela Ekspozicio 1987.

Sur la kampo de la Esperanto-filatelo jam nun troviĝas abundo da diversaj prilaborendaj temoj, kiuj ĉiuj por si mem jam meritas propran ekspozitaĵon. Por citi kelkajn: La Universala Kongreso – Fervojistaj E-kongresoj – Evoluo de nacia E-movadoj (ekz.: La E-movado en Germanio (au en Francio, Pollando, CSSR ktp).

Esperanto en turismo, – La kongresoj de SAT – E-poŝtmarkoj kun variaĵoj – ktp Ni ne nur bezonus "redaktan komitaton" por eldono de e-filatela katalogo, sed ankaŭ "preparan komitaton", kiu iel ordigu la preparon de laŭeble plej diversaj filatelaj ekspozitaĵoj pri Esperanto por nia 1987a ekspozicio! Sed plej racie estus, se ambaŭ entreprenojn estrus unusola komitato.

Vana jam sin deklaris preta kunagi: Ankaŭ mi kunlaboros!

## **Vana pri katalogo de E-tutaĵoj**

Kelkaj niaj membroj min bombardas, kiam fine estos preta katalogo pri Esperanto-tutaĵoj, kiun multaj atendas. Estas fakto, ke mi preparas ĝin jam plurajn jarojn – jen do kelkaj klarigaj vortoj pri kialoj kaj statoj de la afero: Bona bazo por la preparata katalogo estis "Katalogo de oficialaj poŝtaĵoj kun esperanto teksto" de s-ano Saget el Elbeuf – eldonita ŝajne en la jaro 1947 kaj sekve do nekompleta. Bedaŭrinde ĝi enhavas erarojn (kvankam ne multajn), same kiel ĉiuj atingeblaj tutaĵ-katalogoj. En kelkaj filatelaj ekspozicioj mi vidis sovetuniajn tutaĵojn, kiuj ĝis tiu tempo ŝajne neniu nia membro vidis au konis. Necesis do multe pli profunde serĉi informojn, ĉefe pri sovetuniaj tutaĵoj. En la afero helpis eĉ prezidanto de Tema komisiono ĉe Asocio de ĉeĥoslovakaj filatelistoj, kiu ligis kontaktojn kun fakuloj de Sovetunia Filatela Asocio kaj sendigis tien parton de preparata katalogo. Revenis ĉio jam kontrolita kaj korektita vere tre zorge – malgraŭ tio sovetunia fakulo atentigas, ke povas ekzisti io, pri kio eĉ li kaj liaj kolegoj ne scias. . . Katalogo de sovetuniaj tutaĵoj el tiu tempo ne ekzistas, multo de materialo forbrulis en fajro de la lasta milito. . .

Tamen, pli detalajn informojn ne eblas – almenaŭ antaŭ apero de la katalogo – akiri, do el tiu ĉi vidpunkto la manuskripto estus jam preta: sed ekzistas ankaŭ aliaj problemoj – ĉefe tiu, ke ne ekzistas katalogo, kiu priskribus bildojn de

tutaĵoj, kiuj aperis en serio. Escepton faras katalogo de Saget – sed denove ĉijare mi vidis du tutaĵojn, kiujn li ne konis . . . Restas do klarigi kelkajn dubajn punktojn ĉefe pri aŭstraj serioj, poste estos la plej grava laboro finita. Ankoraŭ ĉijare au komence de venonta jaro povus ŝajne aperi la katalogo en ĉeĥa versio (eldonos ĝin sekcio ĉe Ĉeĥa filatela Asocio), poste esperanta. Ambaŭ aldonoj estos ilustritaj – do eble venontjare la longjara laboro estos fine kronita per verko . . .

Helpis al mi pluraj amikoj – ĉi tie mi publike almenaŭ danku al du el ili, s-anoj Amoureux kaj Simon, kiuj donis al mi multajn vere tre utilajn informojn.

Jen ankoraŭ kelkaj neklaraĵoj – mi turnas min al niaj membroj, eble iu el ni povos klarigi la aferon:

- a) aŭstra serio 1936, poŝtmarko dukapa aglo, 35 groŝoj, ruĝa: ĉu el niaj membroj iu vidis au posedas kartojn kun bildoj el Vieno kaj tekstoj Ringstraße, Schönbrunn, Staatsoper, Schwarzenbergplatz, Belvedere? Kaj ĉefe – ĉu iu posedas la karton kun bildo kaj teksto "Oberösterreich, Mondsee"? Ekzistas sufiĉe gravaj duboj pri la ekzisto de tiu ĉi karto, neniu ĝin ĝis nun vidis: sed aliflanke ekzistas karto kun teksto: "Bad Hall, Tassiloquelle", kiun katalogo de Saget ne mencias.
- b) serioj Aŭstrio 1953–55 "Vizitu Aŭstrion!" Kelkaj serioj havas saman tekston sub la bildo, bildoj tamen diferenciĝas. Por detala priskribo necesas do doni pli detalajn informojn pri bildoj. Kiu povas sendi fotokopiojn (kserokso) en grandeco 1:1 de kartoj kun teksto
  - Bregenz, Vorarlberg, Die österreichische Bergstadt am Bodensee, Pfänderbahn
  - Gallspach, Oberösterreich, Sitz des Institut Zeileis
  - Partisau am Achensee, Tirol, 950 m, Grösster See Tirols

Eblas sendi prunte ankaŭ originalojn, kiujn mi redonos poŝtrevene – sed antaŭe skribu pri tio.

- c) ĵuj serioj manciitaj sub b) havas surskribon "Korrespondenz-karte" – sed laŭdire en 17a serio de kartoj aperis subite ankaŭ du kun espranto teksto. Tiu ĉi serio havas la saman markon kaj aranĝon kiel pli supraj, sed la germana surskribo tekstas "Postkarte", ĉu iu ilin posedas au povas doni informojn?
- d) Hungara karto E-7 Debrecen, granda templo, ekzistas en olivbruna koloro, kiu tre klare diferenciĝas de la koloro de la ceteraj kartoj. La koloro ŝajne ne ŝanĝiĝis de suno, kiel povus ŝajni, ĉar la papero estas tute freŝa kiel ĉe ceteraj kartoj: kaj ŝajne ne temas ankaŭ pri dua eldono, ĉar eĉ la plej etaj streketoj kaj detaloj de la bildo estas precize la samaj kiel ĉe la originala koloro (flavece olivverda). Povas do temi aŭ pri erarpreso, provpreso au pri ŝanĝo de koloro alimaniere (eble per gaso aŭ simile).

#### **Redaktora noto:**

Sendube ĉiuj niaj membroj kaj simpatiantoj nun tre zorge serĉas en siaj kolektoj tiun materialon, pri kiu nia amiko skribis, por subteni la por ni tre gravan laboron.

#### **Freŝdataj E-filatelaĵ sukcesoj de Vana:**

Interŝtata fila-ekspo USSR-CSSR en Ĥarkovo 1978:

Granda Ora Medalo plus honora premio

Interŝtata fila-ekspo Ostrava-Katovice en Haviŝov 1978:

Granda Ora Medalo plus honora premio

Nia ELF-AREK-membraro elkore gratulas al s-ano Vana.



## La stampo de la UK en Hago 1920

Tiu stampo certe meritas pliajn esplorojn – laŭ mia opinio temas pri speco de oficiala poŝtkontora stampo, kion montras ne nur la teksto, sed ĉefe ŝtata emblemo. Mi havas du ekzemplerojn de tiu stampo unu sur neuzita karto sen ia ajn teksto kaj sen poŝtmarko), kaj ambaŭ havas videble tute alian kolornuancon ol la datstampo sur la karto bildigita en nia informilo. La kongreson (unuan post la milito) partoprenis nur 408 personoj pro ankoraŭ ne tre bona kaj firma politika kaj ekonomia situacio post la milito: tial en la kongresejo certe ne troviĝis poŝtgiĉeto – ŝajne nur kesto; ŝajne nur poste oni provizis sendaĵojn per la menciita stampo kaj poste forportis al poŝto, kie ili ricevis datstampon. Povas esti, ke "poŝtfacejo" de la kongresejo estis poŝtisto, kiu en la kongresejo eĉ ne estis – oni transdonis al li enhavon de la kesto nur ĉe la poŝto kaj tie li memstampigis ĉiuj korespondaĵojn . . .

*Vladimir Vana*

## Nigra aŭstra E-poŝtmarko

Fakte temas pri t.n. nigra preso; al tiuj, kiuj kolektas la aŭstrajn poŝtmarkojn, tiu afero estas vere jam delonge konata. Ankaŭ FRG, CSSR kaj aliaj landoj havas t.n. nigrajn presojn de poŝtmarkoj. Kvankam la kataloga prezo en specialigitaj katalogoj ordinare ne estas malalta, tamen ne temas pri ia raraĵo el la filatela vidpunkto. Nigrajn presojn oni eldonas memorcele; ili neniam havis kaj ne havas afrankan valoron kaj estas do neekspozindaj. La samo concernas poŝtmarkojn, tutaĵojn au alian filatelan materialon, kiu estis diŝdonata propagandcele kaj havas la surpreson "SPECIMEN", "MUSTER" ktp.

*Vladimir Vana*

## Nova "malnova" argentina poŝta E-stampo?

Nia membro Vladimir Vana trovis verdkoloran argentinan stampon el Rosario 1941, diametro 34 mm kun la teksto INTERAMERIKA FILATELIA EKSPONIZIO – ROSARIO ARGENTINO 6 JULIO 41 kaj EF. LR.

Temas pri "apudstampo". Pli pri ĝi en la sekvonta informilo. Kiu ankoraŭ scias pri ĝi aŭ povus konsulti specialan stampo-katalogon? Bonvolu informi la redaktoron!

---

## Anoncoj

Malnovajn ekzemplerojn de E-gazetoj aĉetas kaj interŝanĝas Ramon Molera, Moya, Sta. Joaquina 13 en Hispanio.

Poŝtmarkojn de Svedio, Anglio, Francio, Hispanio kaj Vatikano, kaj poŝtmarkojn pri famaj personoj kaj pentraĵoj kolektas Szabadi Tibor, Nagykanisza, H-8800, pf 66.

Sovetuniajn specialajn poŝtkartojn kaj poŝtkovertojn kun surprisoj POŝTA KARTO, POŝTA KARTO KUN AFRANKITA RESPONDO, POŝTA KARTO POR RESPONDO, FERMITA LETERO kaj la sovetuniajn Esperanto-poŝtmarkojn en kvarblokoj, kaj sur stampitaj kovertoj kaj poŝtkartoj kaj la poŝtan stampon de Leningrad serĉas Rudolf Burmeister, DDR 9033 Karl-Marx-Stadt, pf 95-39.

E-filatelaĵojn, E-insignojn kaj E-flaĝetojn interŝanĝas Vlada Hasala, CS-691 42 Valtice, N-ro 181.



**Prezidanto de la ELF-AREK-Klubo:**

Ivar Paulsson, S-171 33 Solna, Algatan 3  
Al li sundu la kotizon 15 IRK.

**Redaktoro de la kluba informilo:**

Rudolf Burmeister, DDR 9033 Karl-Marx-Stadt, pk 95-39

Al li sendu informojn pri novaj kaj malnovaj ĉiustecaj E-filatelaĵoj kaj E-glumarkoj, demandojn, proponojn, kritikojn kaj laudojn.



KATA KOTÓWKA 8 gr GDYNIA 21 17-578 ZAWÓDÓSC	Miej 742 iawezego AI 81-240 GDYNIA 21 ICZY (Czas) Zamenhofs (nazwa)	Imię, nazwisko i adres nadawcy <b>URZAD</b> <b>POCZTOWO-TELEKOMUNIKACYJNY</b> ul. Zamenhofs 15 <b>81-240 Gdynia 21</b>
	ADRESAT: Stanisław Bieruda Imię i nazwisko (pełna nazwa instytucji)	
WAGA 150	ul. nr domu i mieszkania, miejscowość ul. 217 Czajkowska Poczta	